ENHAVO	PAĜO
Memorvortoj pri F. de Diego..	1-2
Naciaj / Internacia novaĵoj.....	2-3-4
Recenzoj.....	5
Mensaje a los Esperantistas..	6
Noticias Fundaesperanto.....	7
Maksimanlibro de la minirak...	8-9-10
Jules Verne, la artfaritaj...	11-12

Organo de VENEZUELA ESPERANTO-ASOCIO

ISSN 1316-0451 **33-a Jaro = N. 77 = 2-a Semestro 2005**

MEMORVORTOJ PRI FERNANDO DE DIEGO

Mortis ĉijare, la 30-an de junio, unu el la plej eminentaj esperantistoj de nia tempo. Fernando de Diego, majstro de la tradukarto, unuaranga leksikografo kaj literaturkritikisto, jam eniris por ĉiam la gloran historion de la Esperanto-movado. Ni venezuelanoj ĝuis la privilegion havi lin dum dek jaroj (de 1986 ghis 1996) kiel honoran membron en la estraro de VEA, kaj tiu fakto igas lin ankoraŭ pli neforgesebla. Li estis modesta, ĝentila, kunlaborema kaj helpema, kiel la veraj grandaj homoj. Aŭskulti lin kiel preleganton aŭ konsilanton, aŭ tutsimple kiel fidelan partoprenanton en niaj kunvenoj, estis por ni motivo de fiero kaj plezuro. Li neniam koleriĝis, nek humiligis iun alian, nek postulis iun ajn privilegion por si mem. Kun la sama natura kaj modesta sinteno li faris majstran tradukaĵon, aŭ gvidis enkondukan Esperanto-kurson por grupeto da komencantoj. Resume, li honoris nian modestan Esperanto-grupon per sia amikeco.

Ene de lia gravega kaj ampleksa verkaro, nin koncernas plej rekte la jenaj kontribuaĵoj: a) La traduko de *Doña Bárbara*, fama romano de Rómulo Gallegos, kiu fidele esprimas parton de la venezuela kulturo, historio kaj idiosinkrazio (Venezuela Esperanto-Asocio, Caracas, 1975); b) La traduko de “Silva a la Agricultura de la Zona Tórrida” (*La Agrikulturo de la Tropika Zono*), klasika poemo de Andrés Bello, en kiu ĉi tiu aŭtoro ekzaltas la belecon kaj riĉecon de la ĵus liberiĝintaj Amerikaj landoj (Fundaesperanto-La Casa de Bello, Caracas, 1995); c) La granda vortaro Hispana-Esperanto (*Gran Diccionario Español-Esperanto*, Ed. Mga, Santander, España, 2003). Ĉi-lasta verko estas ege grava instrumento por la parola kaj skriba utiligo de Esperanto; ĝia nura ekzisto markas la maturiĝon de nia lingvouzo, ne nur en Venezuelo, sed en ĉiuj hispanlingvaj landoj. Vidante kaj uzante la vortaron, oni konvinkiĝas ke verŝajne neniu homo povus esti verkinta ĝin same bone kiel Fernando de Diego. Kaj krome, ni fieras ĉar li faris tiun egan laboron ĝuste en Karakas, post lia alveno en 1986, “kiam ia speco de nerezistebla forto impulsis min dediĉi mian tutan tempon al la kompilo de vasta hispana-esperanta vortarego kun speciala prilaboro de la frazeologio.” (Aŭtobiografia skizo de F. de D., en *Klaro kaj Elasto*, Edition Iltis, Schliengen, 2003).

Bela artikolo lia, publikigita en la Centra Universitato de Venezuelo (*El esperanto por dentro*, en Cultura Universitaria Nº 112, Caracas, 1991) finiĝas per la jenaj vortoj:

“Esperanto estas bela lingvo kaj ankaŭ bela aventuro. Ilin travivi certe valoras la penon.” Kaj precipe –ni aldonas- se oni travivas Esperanton tiel intense, celkonscie kaj fruktodone kiel Fernando de Diego.

Jorge C. Mosonyi

VENEZUELA STELO
VENEZUELA
Apartado 47675, Caracas 1041 – A
http://www.esperanto-ve.org
esperanto-en-venezuela@yahoogroups.com

REDAKCIA KOMISIONO: Félix García Blázquez, Jorge Mosonyi, Esperanza Pérez, Andrés Turrisi.

ELDONANTO: FUNDAESPERANTO

VENEZUELA ESPERANTO-ASOCIO
Apartado 47675, Caracas 1041 – A
http://www.esperanto-ve.org
ven_esperanto@yahoo.com

ESTRARANOJ:

PREZIDANTO: Andrés Turrisi
VIC-PREZIDANTO: Jorge Mosonyi
ĜENERALA SEKRETARIINO: Esperanza Pérez
KASISTO: Esperanza Pérez (provizore)
KOMISIITOJ:

BIBLIOTEKO KAJ LIBROSERVO: Peter Jaimez.
KORESPONDAJ KURSOJ, ELDONADO, PROTOKOLADO, VENEZUELA STELO: Andrés Turrisi.
KONSILANTOJ: Félix García Blázquez, Esteban Mosonyi, Alfredo Portillo.

ENLANDAJ DELEGITOJ: Hctor Delgado T. (Mérida), Alfredo Ovalles (Maracay), Germán Montero (Maracaibo), Jesús R. Cedeño (Maturín kaj Ciudad Bolívar).
JUNULARAJ AFEROJ: Yuri Yakimec

ATENTIGO

Pri la enhavo de niaj artikoloj respondecas iliaj aŭtoroj.

Manke de indiko de la aŭtoro, respondecas la redakcio.

Niaj artikoloj kaj informoj povas esti parte aŭ plene republikigataj por laŭleĝaj uzoj, kondiĉe ke oni citu la fonton.

Krome, ni ŝatus ricevi leterojn de niaj legantoj, kun taksoj, opinioj, sugestoj kaj kritikoj. Tio ebligus al ni la plibonigadon de la revuo, pri kio ni antaŭdankas la kunlaborontojn.

NACIAJ NOVAĴOJ

La Venezuela Esperanto-Asocio kunvenis la 26-an de novembro en jaran ordinaran asembleon, por pritrakti diversajn temojn, inter kiuj ĉefrolis la elekto de nova estraro kiu regos dum la venontaj du jaroj. Ĝuste kiam oni pritraktis tiun eron, okazis bedaŭrinda fispektaklo. Oni ne atingis akordiĝon por la voĉdonado, kaj fariĝis necesa prokrasti ĝin ĝis nova fiksota dato. Antaŭ kelke da tempo estiĝis en nia landa movado eta krizo al kiu nepras doni solvon, kaj kiel eble plej frue.

* * * * * * * * * * * * * * * *

La 9-an de decembro 2005, kiel jam tradicie ĉe Familio Bachrich, ni kunvenis en la Zamenhofan Vesperon por festi la naskiĝdatrevenon de nia Majstro. Ĉijare la evento estis okazo por rememori Prof-ron Johanon Bachrich, kiu bedaŭrinde forpasis la 28-an de februaro. Liaj edzino kaj gefiloj petis al la Asocio ke ankaŭ ĉijare ni okazigu la jaran specialan kunvenon en ilia hejmo, konvinkitaj ke tio estintus la deziro de ilia karulo. Kun danka emocio la estraro akceptis la proponon, kaj en la okazo ĉiu el ni rememoris la personecon de nia amiko, kunfondinto kaj Honora Prezidanto de la novepoka AVE, bonfarinto, kaj ĉefa motoro de la movado en Venezuelo. En la solenaĵo ni vidis multnombrajn geesperantistojn kaj simpatiantojn, kaj espereble ni kapablos estonte superi la eblajn malkonsentojn kaj estigi la kutiman amikan etoson.

* * * * * * * * * * * * * * * *

Nia Vic-Prezidanto, Prof. Jorge Mosonyi, daŭrigis la kontaktojn kun la Bolivara Societo de Venezuela, koncerne la projekton eldoni la tradukon de kvar gravaj verkoj de la Liberatoro Simón Bolívar. La 22-an de novembro li kaj Dr-ino Teresa Osorio, Prezidantino de Fundaesperanto, enmanigis al reprezentanto de la Societo la finreviziitan manuskripton. La ĝis nun montrita intereso pri la projekto donas motivojn por esperi ke fine ni vidos nian verkon eldonita.

* * * * * * * * * * * * * * * *

La unua-nivelan kaj dua-nivelan kursojn de Espersnto gviditajn de Prof-ro Johano Negrete en la Fako de Filozofio de la Centra Universitato de Venezuelo (Karakas) kompletigis 8 kaj 3 gestudentoj respektive, el la komencaj 14 kaj 4 gelernantoj. Prof-ro Negrete gvidas similajn kursojn, dotitajn je tri poentoj, ankaŭ en la dua semestro, kiu startis en oktobro. Ni eltiris la informon el la reta paĝo de la Kooperativo Esperanto-Amikaro.

* * * * * * * * * * * * * * * *

El la sama fonto ni prenas la informon ke Prof-ro Negrete planas interesan eksperimenton, nome proponi en 2006 kurson pri filozofio pere de Esperanto. Kompreneble, la kurso efektiviĝos depende de la nombro de interesiĝontoj.

* * * * * * * * * * * * * * * *

Karakas sin preparas por gastigi la Mondan Socian Forumon, kiu laboros inter la 24-a kaj la 29-a de januaro 2006. Inter multnombraj kunsidoj de ankaŭ multnombraj organizoj,ne mankos la partopreno de internaciaj Esperanto-instancoj. La Venezuela Esperanto-Asocio ne ĉeestos en la Forumo, sed la Esperanto-Amikaro, sub la diligenta kaj vigla gvidado de Prof-ro Johano Negrete, aktive partoprenos per abunda programo, en kiu kunlaboros per interesaj prelegoj la fratoj Prof-roj Esteban kaj Jorge Mosonyi, ambaŭ membroj de VEA.

INTERNACIAJ NOVAĴOJ

La urbo Florenco, en Italio, gastigos la ĉijaran Universalan Kongreson de Esperanto de la 29-a de julio ĝis la 5-a de aŭgusto. Du UK okazis antaŭe en Italio: en Romo(1935) kaj en Bologna (1955). La temo de la ĉijara UK estos *Lingvoj, kulturo kaj edukado al daŭrigebla evoluo,* kaj en ĝia traktado partoprenos la eminenta lingvopolitika fakulo François Grin, profesoro en la Universitato de Ĝenevo.

Verŝajne du venezuelaj esperantistoj partoprenos en la Universala Kongreso. Ili planas sian ĉeeston, sed estas ankoraŭ tro frue por esti certaj pri la fina efektivigo.

* * * * * * * * * * * * * * * * *

Tuj post la fermo de la UK, centoj da junuloj partoprenos en alia tutmonda evento: La 62-a Internacia Junulara Kongreso de Esperanto. Sarajevo, en Bosnio-Hercegovino, havos la honoron gastigi kvarafoje ekde la jaro 1914 la Internacian Kongreson de la Junaj Esperantistoj.

* * * * * * * * * * * * * * * * *

La 39-a ILEI-Konferenco okazos de la 25-a ĝis la 29-a de julio 2006 en Parma kaj estas rigardebla kiel unu el la antaŭkongresaj eblecoj.

Temo de la konferenco: Lingvaj rajtoj, lingvolernado kaj edukado por ĉiuj.

La konferenco sesios en la Istituto Salesiano San Benedetto. Estas diversnivelaj tranokteblecoj en la konferencejo mem kaj en ties ĉirkaŭaĵo. La prezoj varias inter EUR 21,00 kaj EUR 75,00 (en tendo aŭ ruldomo 6,00 EUR, en amasloĝejo 3,00 EUR kaj memzorgado).

Aliĝkotizo varias inter 15,00 EUR kaj 70,00 EUR depende de la kategorio kaj loĝlando de la aliĝanto. Por mendoj atingantaj la organizantojn post la 1-a de majo 2006 oni devas aldone pagi EUR 40,00. Post la 1a de junio 2006 ne plu eblos mendi por vi tranoktejon.

Kadre de la konferenco oni traktos temojn kiel ekzemple: lingvaj rajtoj en la lernejoj, edukmodeloj en pluretnaj socioj, modeloj kaj ekzemploj de interkultura edukado, kvalitaj lingvoinstruistoj por kvalita lingvolernado, instruado de lingvoj kiel formo de sociigo, esperanto en lernejoj kaj interkultura komunikado. Okazos scienca simpozio kune kun universitatanoj ne-esperantistoj, lingva festivalo kaj, interalie, sesio de la Internaciaj Ekzamenoj de ILEI/UEA.

* * * * * * * * * * * * * * * * *

La redakcio de Venezuela Stelo, organo de Venezuela Esperanto-Asocio, salutas kaj gratulas la ok elstarajn Esperanto-agantojn kiujn okaze de la UK en Vilno la Komitato de UEA distingis per la Honora Membreco de la Asocio. Nin aparte kontentigas ekscii ke inter la novaj Honoraj Membroj troviĝas ankaŭ Ursula Grattapaglia, kiun ni havis la plezuron koni kaj trakti persone antaŭ multaj jaroj.

RECENZOJ

“BEING COLLOQUIAL IN ESPERANTO a reference guide for Americans” far: “David K. Jordan” 1992

Temas pri vere bone farita esperanto-gramatiketo, kun grava pritrakto de la falsaj amikoj kaj la paronimoj. Pli malpli la duono de la verko estas vortaro kun klarigoj pri la signifoj de dubaj vortoj. Ĝi klarigas ekzemple la uzon de “far”, kiu estas mallongigo de “fare de” multe uzata sed, kiel kelkaj esperantistoj diras, ne tute korekta ĉar ne estas regula la uzado de parto de verbo kiel prepozicio. Anglaj lingvanoj povas uzi ĝin kiel daŭriga kurso. Kiel enkonduko al la lingvo ĝi ne taŭgas, tial ke ne estas lernokurso, sed se vi bone regas la anglan, ĝi estos bona helpilo al perfektiĝo. La titolo parolas pri usonanoj, sed ne estas utila nur al ili; ĉiuj povas uzi ĝin, eĉ se la angla estas nur via dua lingvo. Mi plene rekomendas ĝin.

“ESPERANTO LAŬ LA PATRINA METODO, NACH DER MUTTERMETHODE” far: “August Weis” 1979

Tiu ĉi verko estas tute alia afero. Ĝi estas laboro de amo. La verkisto ne nur deziras fari lernolibron: li proponas tute novan manieron de lernado de lingvoj. Lia ideo estas enkonduki iu ajn lingvon antaŭ la sesa vivjaro de la infano, tiamaniere la knabetoj povas heredi du, tri aŭ eĉ kvar lingvojn sen problemoj. Ĝi estas dulingva verko esperanta-germana. La ideo estas ke pere de ĝi germanlinvanoj instruos esperanton, sed estas libro farita kun amplekso kaj zorgo, tiel ke tradukante ĝin, la libro povus esti ankaŭ uzebla kun aliaj lingvoj. Li enhavas multegajn frazojn en ambaŭ lingvoj kaj malgrandan vortareton esperanta-germanan je la fino. Tutcerte ni ne havas antaŭ ni la kutiman lernolibron, sed la ideo estas interesa kaj meritas esti konata. La libro ankaŭ povos utili kiel helpilo al la lernado de la germana.

Mi konas nur unu libron kiu permesas lerni alian lingvon pere de esperanto. Temas pri la enkonduko al la lingvo “Interlingua” de Godel pere de esperanto. Ankaŭ estas troveblaj en esperanto kelkaj frazlibretoj pri la lingvo de iuj landoj en kiuj iam okazis UK. Estos interese lerni pere de la racia esperanto iun nacian lingvon; se tia verko estos zorge farita uzante la specialajn trajtojn de la internacia lingvo, ĝi povus esti utilega verko, “Kiel lerni la anglan pere de esperanto” aŭ la hispanan, la germanan, k.t.p. Jen laboro farenda. Ankaŭ kiel helpilo al la lernado de malgrandaj lingvoj tiaj lernolibroj estos utilaj, kaj la eŭska, la gvarania, la quechua (keĉŭa) k.t.p. povus profiti eĉ pli multe ol la grandaj lingvoj.

Peter Jaimez

A LOS ESPERANTISTAS Y SIMPATIZANTES VENEZOLANOS

Queridas amigas, Estimados amigos del Esperanto,

La finalidad de la Asociación Venezolana de Esperanto es promover la divulgación del Esperanto en nuestro País y dar a conocer los valores de nuestra cultura, historia y costumbres en el mundo entero por medio del Idioma Internacional.

Es obvio que, para lograr estos objetivos, la Asociación necesita la colaboración de sus miembros y simpatizantes, y es por eso que les pedimos se hagan miembros de la Asociación y/o de la Fundación Cultural Esperanto (FUNDAESPERANTO).

El propósito de FUNDAESPERANTO es desarrollar actividades culturales relacionadas con el Esperanto, y recabar fondos para el financiamiento de la sede y las actividades de la Asociación.

CUOTAS ASOCIATIVAS PARA EL AÑO 2006

1.- ASOCIACION VENEZOLANA DE ESPERANTO:

MIEMBROS ACTIVOS (MA):
Una (1) cuota anual de Bs. 80.000 ó
Dos (2) cuotas semestrales de Bs.42.000 ó
Cuatro (4) cuotas trimestrales de Bs. 23.000
ESTUDIANTES Y FAMILIARES (E/F) DE LOS MA:
El 50% de la cuota para los MA
MIEMBROS PATROCINANTES (MP):
Además de la cuota AM pagan Bs. 8.000 mensuales
ESPERANTISTAS DEL INTERIOR U OTROS AMIGOS DEL ESPERANTO:
Una (1) cuota anual voluntaria de no menos de Bs. 40.000
NOTA: Las cuotas asociativas podrán pagarse:
a) directamente a la persona encargada de la Tesorería
b) con depósito en la Cuenta Corriente Nº 01380020130200004778 de la Asociación Venezolana de Esperanto en el Banco Plaza.

Favor informar al teléfono 0212 = 283.65.72 el número del comprobante de depósito, la cuenta bancaria, el monto y el nombre del depositante.

2.- FUNDACION CULTURAL ESPERANTO (FUNDAESPERANTO)

Una (1) cuota única anual de Bs. 60.000
Los miembros **honorarios** no cancelan cuota alguna.

IMPORTANTE: Las cuotas asociativas podrán pagarse:
a) directamente a la Tesorera, Sra. Esperanza Pérez
b) con depósito en la Cuenta de Ahorro Nº 0105-0659-02192-3 de la Fundación Cultural Esperanto en el Banco Mercantil.

*** Favor informar al teléfono 0212 = 283.65.72 el número del comprobante de depósito, la cuenta bancaria, el monto y el nombre del depositante.**

La fundación Cultural Esperanto **(FUNDAESPERANTO)** continúa en su empeño de propiciar el conocimiento del idioma Esperanto en el País, así como de difundir nuestros valores, principalmente los culturales e históricos, dentro y fuera del territorio nacional.En este sentido, los integrantes de la Junta Directiva, nos hemos impuesto el reto de conseguir la publicación en versión bilingüe: esperanto-español, de cuatro documentos de nuestro Libertador Simón Bolívar: el Discurso de Angostura, la Carta de Jamaica, el Manifiesto de Cartagena, Mi delirio sobre el Chimborazo.

La traducción del español al esperanto de estos documentos se ha logrado gracias a la labor tesonera de tres brillantes **samideanoj,** comprendidos desde muchísimos años con el movimiento esperantista, movimiento al que le han dado vida y renombre en Venezuela. Son ellos el Señor Andrés Turrisi, editor de "Venezuela Stelo", actual presidente de la Asociación Venezolana de Esperanto; el Doctor Jorge Mosonyi, varias veces presidente y el insigne lingüista, estudioso permanente de nuestras etnias, profesor Esteban Mosonyi.

Un trabajo final preparado acuciosamente por los traductores, del cual podemos afirmar que resultó perfecto, entregamos en el pasado mes de noviembre a la Sociedad Bolivariana de Venezuela, con tres de cuyos miembros hemos sostenido conversaciones desde hace aproximadamente un año y quienes han alimentado nuestra esperanza de ver publicados estos documentos cumbre de nuestra nacionalidad.

No tenemos la absoluta seguridad de que serán publicados los documentos por esta prestigiosa sociedad aún siendo la más idónea para ello, por tanto, instamos a los lectores de "Venezuela Stelo", que puedan influir e interesar a alguna institución o editorial para que nos ayuden a obtener los medios que nos lleven al fin propuesto: la publicación de estos cuatro textos del Libertador. Les recordamos que en el año 1995 conseguimos que la Casa Bello publicara en la Colección Anauco: textos y estudios bellistas, "La agricultura de la Zona Tórrida", de Don Andrés Bello. "Versión en Esperanto: Fernando de Diego. Primera edición bilingüe Esperanto-Castellano. 1994. Edición Fundación Cultural Esperanto. Fundaesperanto. Caracas"

Reiteramos que Fundaesperanto trabaja por los intereses culturales de AVE y por ende del Esperanto. Esto lo hacemos sin protagonismos personales, pues estamos concientes de que "en la Fundación prevalece el elemento material, el patrimonial sobre el elemento humano, la persona. El beneficio no es interno, como sería producir una ventaja para los propios asociados, sino un fin externo, de utilidad general. En nuestro caso, divulgar el esperanto en Venezuela, dar a conocer nuestra cultura en el mundo a través del esperanto.[1] Por tanto, les solicitamos encarecidamente su colaboración para obtener el fin propuesto.

Gracias.

Teresa Osorio de Villasmil

[1] Osorio de V. Teresa. "Historia de Fundaesperanto:1988-2004".

MAKSIMANLIBRO DE LA MINIRAKONTO

Luis Britto García (1940)
Esperantigis: Jorge C. Mosonyi

-Krom la vivo, ĉio devus esti mallonga.

-Ni travivas nur la momenton: la vorto kiu plenigas ĝin plenigas ankaŭ la ekziston.

-Ni plirapidis ekde la katakali-dramo, kies surscenigo daŭras tri tagojn, ĝis la greka tragedio kiu daŭras unu nokton, ĝis la kvin horoj de la opero, ĝis la horo kaj duono de la filmo, ĝis la dudek minutoj de la televidserio, ĝis la kvin minutoj de la videoklipo, ĝis la dudek sekundoj de la televidreklamo, ĝis la sekundo de la minirakonto.

-Samtempeco estas segmentado: de tipoj en presejo, de planoj en komikso kaj kinarto, de genoj en biologio, de partikloj en fiziko, de bitoj en informadiko, de mikrotekstoj en literaturo.

-Ni antaŭeniris ekde Augusto Monterroso, kiu konstruas per sep vortoj senfinan dinosaŭron*, ĝis la verkistino kiu resumas sian membiografion en unu vorton, preterpasante Forrest Ackerman-on, kiu sintezigas en unu signon la Historion de la tuta tera civilizacio, ĝis Dio kiu kompendias la kreadon en unu verbon.

-En unu momento la formoj de konstruaĵoj, veturiloj, vestaĵoj, statuoj, pentraĵoj, simpliĝis ĝis la leĝereco, dum la literaturo komplikiĝis ĝis la fatraso.

-Religio elpuriĝas en proverbon, eseo en aforismon, poezio en haikuon, ribelo en grafition, plastiko en minimalismon, amo en galantaĵon, sperto en maksimon, morto en finvortojn, fikcio en minirakonton.

-La pezeco malunuigas saluton, referencon, instigon, subjektivecon, poezion, metalingvaJon: la mikrofikcio ilin reakordigas en la ekstazon de la senpezo.

-Ĉiu kulmino de iu ĝenro estas esploro pri ties minimumaj konstituaj elementoj.

-Laŭ la paradoksleĝo, nur la minimumo povas komprenigi al ni la senmezuron.

-Pro sia splendo brilas izolite steloj kaj mikrotekstoj.

-La korpo ne rezistas legaĵon pli longan ol la surfaco je kiu ĝi apogiĝas: unu paĝon staranta, kvar sidanta, tridek kuŝanta.

-Povas esti mikrofikcio milpaĝa verko se en ĉiu paĝo brilas infinito; male la redundo igas senfina unu solan paragrafon.

-La aŭtoro aŭ la forgeso senpezigas majstroverkon ĝis nur la memorinda frazo restas el ĝi.

-Ruzaĵoj de la minirakonto estas: la titolo foje pli longa ol la teksto; alvoki la kuntekston de titoloj aŭ nomoj kiuj kunportas historion; aŭ resumi en ĉiu vorto la lingvon kaj en ĉiu lingvo la universon.

-Donu al mi minitekston kiel apogilon kaj mi movos la mondon de la imagado.

-Ĉiu kreitaĵo estu kiel la memoro, kiu nur rehavigas momentojn.

-Vundas la spado ĉar ĝia pinto estas reduktita al la minimumo kiu koncentrigas la spado-pikon.

-Eniras la tuta denseco de la galaksio en la punkton de la nigra truo, kaj la tuta splendo de la parolo en la mikrotekston.

-Malmultaj vortoj por la bona komprenanto; por la leganto kiun oni taksas stulta, multegaj.

-Dum la tuta vivo ni serĉas la perfektan formon de unu sola rakonto, unu sola metaforo, unu sola signo.

-La bona verkisto reduktas la romanon al la frazo kaj la bona komprenanto ekde la frazo reinventas la bibliotekon.

-Nur la fulmo pravigas la ŝtormon.

-Nur la sekundo igas la tempon eltenebla, kaj la sablero la infiniton.

-La laboro investita en la verkon estas inverse proporcia al ties amplekso.

-Kio restus se ni forigus redundon el romanoj kaj vivoj?

-Por ke la vento blovu en la memoro vivis Pancho López kiel ciklono.

-Kiam la leganto de Monterroso vekiĝis, la dinosaŭro ankoraŭ ĉeestis.

-Ni neniam memoras la libron sed la minirakonton kiu ĝi povintus esti.

-La minirakonto naskiĝas de la amindumo inter aktiva rakontanto kaj interaktiva leganto.

-La larvo maturiĝas dum jaroj por la splenda tago de la papilio.

-Nur flugas la ardeo ekde la momento je kiu la praktiko ĝin liberigas de la lasta superflua pezo.

-Nenio apartigas la puran ideon de la mikrorakonto.

-Nur la inspira ventobato kontaĝas tion nerakonteblan.

-Kiom ajn oni kuras, nur la alveno gravas.

-La milo kaj unu kompletiĝis nokton post nokto.

-Nur ekzistas la momento kaj la cetero estas memoro aŭ espero.

-La mikrorakontanto proponas, la leganto disponas.

-Per la mikrorakonto la leganto investiĝas je la karaktero de Dio aŭ je la defio krei universojn ekde nura murmuro.

-La mikrorakonto estas la falo en abismon kies limo estas la silento.

-Dio estas la mikrorakonto ekde kiu resumiĝas la infinito.

-Nur perfektas la strukturo je kiu estas forigita ĉio superflua.

-Ne perfektas la mikrofikcio kiu finiĝas en malmultaj vortoj, sed tiu kiu neniam finiĝas en la memoro.

-Estas nur unusola la vorto de la mallongeco kaj de la infinito.

-Ĉiu vorto estas kompleta historio.

-Tiom plilongigis la verkisto sian historion, ke li alvenis al ties komenco.

-Senespera ĉar neniu ĝin komprenas, la maro plue ripetadas la minirakonton de la ondo.

-La mikrofikciisto semas semojn, sugestojn.

-La minirakontisto transdonas la plej simplan ludilon al la infano-leganto kiu preferas imagi sian propran ludon.

-La limo de la laboro de mikrofikciisto estas tio kion devas kompletigi la leganto.

-La peza verkisto transdonas la puzlon finsolvita; la mikrofikciisto nur la solan pecon kiu ebligas rekonstrui la universon.

-Ĉiu mikrofikciaĵo povas reverkiĝi en mil paĝojn, kaj ĉiu librego reduktiĝi en minirakonton.

-La vero de mikrofikcio, simile al tiu de verso, ne enteniĝas en la kalkulado de silaboj, sed en la intenso per kiu ĉiu vundas nin.

-Matematiko kaj minirakonto simpligas ekvaciojn ĝis la trovo de nekonato; la fatraso konfuzigas ilin ĝis la enterigo pro nekomprenebleco.

-La mikrofikcio estas la fadeno de Ariadno kiu nin liberigas de la labirinto de ĉio-amplekso.

-Teseo senkapigas la Minotaŭron de superabundo per la glavo de elipso.

-Nenio pli mallonga ol la ideo, kio ampleksas ĉion.

-Ĉiu ĝojo estas intensa, ĉiu soleneco ampleksa.

-La verkado, la delogo, estas artoj de sugesto.

-La eterno eniras en momenton.

-Resumu ĉion antaŭan en unu frazon, unu vorton, unu signon.

-Skribu la vorton kiu enhavas ĉiujn vortojn en ĉiuj eblaj lingvoj.

-Okazos la Apokalipso en la tago je kiu Dio malkovros la sekreton de minirakonto.

-Alvenos la Fino de la Tempoj kun la aforismo kiu igos la mondon redunda.

* * * * * * * * *

*Augusto Monterroso estas fama gvatemala verkisto (1921-2003), aŭtoro de la plej mallonga hispanlingva rakonto, kiu konsistas el nur sep vortoj: “Cuando despertó, el dinosaurio todavía estaba allí.” (“Kiam li vekiĝis, la dinosaŭro ankoraŭ ĉeestis.”)

Noto pri la aŭtoro kaj la teksto: Luis Britto García (Karakas, 1940) estas elstara verkisto kiu jam publikigis pli ol kvindek librojn, en diversaj ĝenroj: romano, novelo, teatro, eseo, historio. Li gajnis dufoje la internacian premion “Casa de las Américas” (Kubo) kaj ricevis en Karakas la Nacian Premion pri Literaturo kiel rekono pro la tuto de lia verkaro. Krome, li estas advokato, universitata profesoro, prelegisto, humuristo kaj eĉ karikaturisto kaj subakva esploristo.

La eta teksto kiun ni esperantigis por V.S. estis publikigita la 26-an de decembro 2004, en la ĵurnalo “Últimas Noticias” de Karakas, kie Britto García aperigas humur-kolumnon ĉiudimanĉe. Ĝi estas bona elmontro de lia stilo konciza, densa, riĉa je lingva kaj enhava vidpunktoj, kun abundo da esprimrimedoj kiaj paradokso, hiperbolo, eĉ ridindigo kaj absurdo. Britto García prenas la minirakonton aŭ mikrotekston kiel elirpunkton por esplori la rilatojn inter lingvo kaj vivo, inter parolo kaj realo, esprimante siajn ideojn originale per brilaj kaj spicaj aforismoj, kiuj stimulas spritan kaj saĝan pensadon.

* * * * * * * * * * *

JULES VERNE, LA ARTFARITAJ LINGVOJ KAJ VENEZUELO

Víctor Sirvent

Je la pasinta 24-a de marto, oni solenis la centjariĝon de la morto de la fama franca verkisto Jules Verne. Li estas tre konata pro la serio de romanoj kiun oni nomis *Les Vojages Extraordinaires* (La Eksterordinaraj Vojaĝoj). Inter liaj plej famaj verkoj, oni povas mencii **Dudek mil leŭgoj sub la maroj, La Mistera Insulo, Vojaĝo centren de la Tero, De la Tero al la Luno** kaj **La ĉirkaŭiro de la mondo en 80 tagoj.**

Jules Verne estis tre fekunda verkisto. La serio *La Eksterordinaraj Vojaĝoj* konsistas el kvindek kvar longaj romanoj. Li ankaŭ verkis teatraĵojn kaj mallongajn romanojn, krom dek kvar romanoj eldonitaj postmorte.

La kreinto de personoj kiaj Kapitano Nemo, Aronnax, Phileas Fogg, Passepartout, Michel Strogoff, Robur, Michel Ardan naskiĝis en Nantes je la 8-a de februaro 1828, kaj mortis en Amiens je la 24-a de marto 1905.

Oni povas konstati en liaj verkoj ke Verne interesiĝis pri la artfaritaj lingvoj. En la romano **Dudek mil leŭgoj sub la maroj** *(Vingt mille lieues sous les mers)* Kapitano Nemo, kiu estas poligloto, parolas kun siaj ŝipanoj en iu stranga lingvo. La ŭutoro nur montras unu frazon de tiu lingvo; *Nautron reapoc lomi virch.* En tiu frazo oni trovas latindevenajn vortojn kiel *nautron,* angl-devenan vorton kiel *lorni,* el *lorn, forlom* kaj german-devenan vorton kiel *virch,* el *verloren.* Plena analizo de la etimologio de tiu frazo estas trovebla en [1] (paĝo 102). La eldono de tiu verko okazis en la jaro 1874, kvar jaroj antaŭ la naskiĝo de la ideo de Volapük, la lingvo kreita de J.M. Schleyer, kiu estis la unua artfarita lingvo disvastigita tra la landoj kaj kaptis multajn sekvantojn

.

En la jaro 1880 li aŭdis pri Volapük [2]. Oni povas trovi kelkajn citaĵojn pri tiu lingvo en la romanoj *Sans dessus dessous* (1889) kaj *Claudius Bombamac* (1893).

Verne interesiĝis pri Esperanto kaj ĝia movado. En la jaro 1903, fondiĝis la Esperanto klubo de la urbo Amiens, kie li loĝis. Li iĝis la honora Prezidanto de tiu grupo. Dum tiuj jaroj li komencis verki romanon kiu traktas pri Esperanto, **Esplorvojaĝo.** Tie la aŭtoro montras ke la lingvo Esperanto havos gravan taskon en la disvastigo de la civilizo kaj komerco en Afriko. Lia morto interrompis tiun verkon. Tiu nefinita manuskripto estas tradukita al Esperanto kaj eldonita (3].

Verne verkis romanon kies intrigo okazas en Venezuelo, **La Impona Orínoko** *(Le Superbe Orénoque),* eldonoita en 1898. Tiu libro pritraktas la serĉadon de la fontoj de la plej longa kaj granda rivero de Venezuelo: Orinoko. Unu el la ĉefaj personoj de la verko nomiĝas "La

Patro Esperanto", en la originalo franca li estas *Le Père Esperante* [4¡. Ĉi tie estas la unua referenco de Verne al Esperanto en lia verkaro, tamen en la tuta romano li ne mencias la lingvon Esperanton. Oni scias ke la nomoj de la personoj en la verne-aj romanoj ne estas hazarde elektitaj; kutime ili havas simbolajn signifojn, sugestas historiajn aŭ aliajn signifojn, kelkfoje ili estas anagramoj aŭ vort-ludoj. Do, en tiu kazo, oni povas sugesti, spekulativi aŭ konkiudi ke la elekto de la nomo de tiu persono kiel "Patro Esperanto" estas referenco al la internada lingvo, pro la intereso de la verkisto pri artfaritaj lingvoj. La grava rimarko estas ke tiu indiko al la vorto "esperante" okazis antaŭ la fondiĝo de la esperanto klubo en Amiens.

Venezuelo eldonis poŝtmarkon rilate al *La Impona Orinoko* montrantan la vizaĝon de Jules Verne en la jaro 1982. Okaze de la centjariĝo de la eldono de *La Impona Orinoko*, la *Fondation Jules Veme du Vénézuéla* faris luksan ilustritan dulingvan (francan kaj hispanan) eldonon de tiu verko. En aprilo de ĉi tiu jaro debutis en la venezuelaj kinejoj la filmo *1888: El Extraordinario Viaje de La Santa Isabel* (1888: La eksterordinara vojaĝo de La Sankta Isabel), dírektita de Alfredo Anzola. Ĝi baziĝis sur la vivo de Verne kaj tiu romano.

Citaĵoj

[1] Jules Verne, 20,000 Leagues Under The Sea, Translated by W.J. Miller and F.P. Walter, Naval Institute Press, 1993.

[2] Jules Verne et l'esperanto, *Le Courrier de l'ouest,* 1993/07/28.

[3] J. Verne, Esplorvojaĝo, Tradukis István Ertí, *Franca Esperantista,* Aprilo 1994.

[4] J. Verne, Le Superbe Orénoque, Fondation Jules Verne du Vénézuéla, 1997.

Remitente/Sendinto:
Venezuela Esperanto-Asocio
Apartado 47676
Caracas 1041-A = VENEZUELA

PUBLICACIONES NACIONALES